# *Povoj de Venezuelo subtenas sian konstitucian prezidenton Nicolás Maduro.*



Karakaso, 25 jan (RHK) La prezidento de Venezuelo, Nicolás Maduro, posedas hodia? la subtenon de la ?tataj povoj fronte al la klopodoj efektivigi pu?on kontra? la konstitucia prezidento,  subtenate de la registaro de Usono.

Dum ceremonio okazinta pro la jura jaro 2019, la estro de la Supera Kortumo de Justico, Maikel Moreno, asertis ke tiu ? institucio rekonas Maduro kiel la solan prezidenton legitiman de la bolivara respubliko de Venezuelo, la? raportas la informa agentejo Prensa Latina.

La magistrato aldonis ke tiu ?i institucio malagnoskas ?iujn pretendojn uzurpi la funkciojn de la ekzekutivo kun la “grava celo primoki la volon de la popolo” fronte al la sin proklamo de la supera reprezentanto de la Parlamento en le?a malrespekto, Juan Guaidó, kiel “prezidento en funkcioj” de Venezuelo.

Siaflanke, la nacia elekta konsilantaro de Venezuelo anka? malagnoskis la agojn de la nacia opozicio kiu celas ignori la nacian suverenecon kaj instigi militan pu?on en la lando.

Anka? la prezidanto de la respublika morala konsilantaro kaj ?enerala prokuroro de la respubliko, Tarek William Saab, rifuzis la eksterlandan enmiksi?on en la internaj aferoj de Venezuelo kaj ratifis la suverenan kaj sendependan karakteron de la lando.

La legitima kaj konstitucia prezidento de Venezuelo anka? ricevis la subtenon de ?iuj staboj de la naciaj armitaj bolivaraj fortoj kaj de la guberniestroj de 19 ?tatoj de la sudamerika lando.

---

https://www.radiohc.cu/eo/noticias/internacionales/181922-povoj-de-venezuelo-subtenas-sian-konstitucian-prezidenton-nicolas-maduro

**Radio Habana Cuba**